

ILEI kongresos en Serbio en 2019

La Estraro de ILEI, skajpkunside la 7an de julio, decidis: La 52-a Kongreso de ILEI okazos en Ĉaĉak, Serbio, 13-20 julio 2019, en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj, apartenanta al la Universitato de Kragujevac. La kongresa temo interkonsentita kun la kongresgastiganto:

Lernado en virtualaj komunumoj

- apartenas al la sfero de interesoj de ILEI;
- gravas por gastiganto de la kongreso - la fakultato, kiu okupiĝas interalie pri lertigado de instruistoj de teknikaj fakoj kaj pri la uzado de informteknologioj en edukado (do komuna intereso de ILEI kaj la fakultato);
- ligeblas al la Internacia jaro de indiĝenaj lingvoj 2019 (ekzemple per atento pri virtualaj lernkomunumoj de indiĝenaj popoloj, ankaŭ de esperantistoj);
- estas bona temo por universitata internacia konferenco enkadre de la ILEI-kongreso (anstataŭ la kutima ILEI-simpozio), kies kunorganizanto estos la fakultato.

Kial Serbio kaj Ĉaĉak?

- La iam tre vigla kaj nun perdinta la forton E-movado en sudorienta Eŭropo, kaj precipe en Serbio, bezonas kuraĝigan impulson.
- Serbio iom longe restas relative nekonata de esperantistoj kulture, turisme kaj gastronomie, do malkovrinda.
- Serbiaj vizoj ne estas bezonataj por turistoj el multaj landoj kaj la viza reĝimo de Serbio povas esti pli oportuna por kongresanoj el Afriko kaj sud-orienta Azio ol kiam oni vojaĝas en aliajn ŝtatojn de Eŭropo.
- Bonaj flugtransportaj ligoj kun Finnlando, por atingi la UK.

Plus bonaj kondiĉoj:

- por la kongresa programo:
 - prelegejoj kaj aŭloj de la fakultato
 - studenta restoracio kaj kunvenejoj de la proksima studenthejmo
 - najbaraj sportaj terenoj kaj naĝejo
 - koncertejo en la *Kulturdomo* je promendistanco
- por la loĝado:

- novkonstruitaj kaj komfortaj studenthejmo kaj loĝdomo de mezlernejoj tuj apud la kongresejo
- urbaj hoteloj kaj hosteloj je promendistanco
- por la *Infana universitato*:
 - proksimaj infanĝardeno kaj loĝdomo de mezlernejoj

Antaŭ- kaj/aŭ post-kongrese

- Viziti Serbion kaj konatiĝi nur kun Ĉaĉak kaj ĝia ĉirkaŭaĵo – estus domaĝe malmulte.
- Se vi venos tri tagojn pli frue, la antaŭkongresa ekskurso videbligis kaj ĝuigos al vi multe pli: Beogradon kaj vidindaĵojn inter ĝi kaj Ĉaĉako.
- Simile postkongresa ekskurso se vi ne hastos al Lahtio por la UK.

Programkontribuoj

Viajn prelegproponojn kaj aliajn kontribuproponojn por la kongresa programo, aŭ komentojn, demandojn kaj proponojn sendu al ilei.kongresoj@gmail.com aŭ al la poŝtadreso de la estrarano pri kongresoj, trovebla sur la dua kovrilpaĝo de la revuo.

La kongresejo

Bonvenon!



